# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 18. — REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. — Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

Ĉar ĝis la 16-a de aŭg. mi ne ricevis ian sciigon pri re- aŭ neelekto de mia persono kiel redaktanto, mi tamen redaktas ankoraŭfoje (do lastfoje) ĉi tiun Paĝon. *Hu.*

---

## LA DIA SENCO DE LA SENLABORECO

En la aprila kajero de la germanlingva gazeto "Der Rufer" (La Vokanto) eldonejo: Johannisbund-Verlag en Leutersdorf apud Rejno (Germanio) skribas la patro Rosenbach, ordenmonaĥo de ordeno de la *Senmakula Virgulino* sub la surskribo *"Goja evangelio por la senlaboruloj"* interalie jenon: . . ." Sur la placoj k stratanguloj staras senlaboruloj. Ili faras nenion. Se oni demandas ilin, ili respondas: Ni estas senlaboraj, kion alian ni faru? Sed Kristo, kiu ĉiam estis sincera amiko de la mizeruloj, ĉu li estus kontenta per tia senkulpigo? Tute ne! Certe ankaŭ li elvokus veon pri la ordonemaj homoj, kiuj ne havas la necesan senton por la mizero de la malriĉuloj . . . sed Kristo ankaŭ mallaŭdus ĉi tiujn senlaborulojn k mallaboremulojn: "Kial vi staras maldiligente la tutan tagon?" La apostolo Paŭlo, kiu ne volis, ke la komunumoj zorgu pri li, iam diris: "Kiu ne volas labori, tiu ankaŭ ne manĝu!". Hodiaŭ li skribus en la sama senco: *"Kiu ne laboras, tiu preĝu! Sed kiu ne volas preĝi, ankaŭ ne manĝu, ĉar li neniel plenumas la de la kreinto donitan vivtaskon.* Tio ŝajnas al mi esti la profunda dia senco de la senlaboreco: havi pli da tempo por la supernaturo, havi pli da tempo por dio k por la animo, por preĝo k religia ago . . . Kiu por la popolkomuno ne laboras, tiu devas por la popolkomuno preĝi" —.

Preĝo anstataŭ pano. Tio estas la kristana socia bonfaro. Ĉu tio ne estas primokego de la senlaboruloj? Vere, tiaj fipastroj meritas, ke la ekscitita popolamaso linĉu ilin. *Hu.*

---

## VESPERO ĈE "KULTURPIONIROJ"

Ni ŝatas tiajn memtravivaĵojn pli ol tradukojn de teoriaj artikoloj, ĉar estas ankaŭ nia tasko observadi la kontraŭulojn. Kunlaborantoj sekvu al tiu ekzemplo.

Pri religia movado en Svedio oni ne multon aŭdis sur nia paĝo. Eble vi al "nia" lando aljuĝas altan kulturon, k pro tio kredas, ke religiaj movadoj ĉe ni ne estas fortaj nek bone progresadas. Vi ankaŭ certe scias, ke ĉe ni la protestanta eklezio estas ligita al la sveda ŝtato. Tamen ni ne kredu, ke ne ekzistas religimovadoj subtenataj de la ŝtato. Ĉe ni estas diversaj religiulasocioj, ekzemple: baptistoj, savarmeo, pentekost-amikoj ktp. Por stultigado al homoj tiuj "kulturamikoj" harmonie kunlaboras k nun ni rakontos al vi pri lastatempa laŭŝajna sukceso de vek-predikanto, ĉu stultulo, ĉu ruza fripono, ni ne scias, kiu propagandas laŭ tute nova sistemo. Antaŭe tiaspecaj "Kulturpioniroj" agis en preĝejoj k inter siaj kredfratoj. La novaperinta vek-predikanto, Frank Mangs, tamen ne estas tiom humila, ĉar antaŭ kelkaj monatoj li nokte predikadis en kinoj, post prezentado de ordinara filmo. Tie li senpage donis sian venenon al la urba gejunularo, kiu plejparte konsistas el malriĉaj industrilaboristoj. Multaj junulinoj donis dum tiaj spektakloj sian "animon" al dio, ĉar la pastro estas tre belaspekta k juna. Post kelkmonata foresto nun tiu pastro revenis ĉi tien kun granda cirka tendo enhavanta sidlokojn por 1500 personoj. La tendon li bezonas, ĉar lia publiko estas tiom granda, ke ĉi tie mankas sufiĉe granda salonego. Nun tiu "pinto" opinias, ke li savos la animojn de ĉiuj loĝantoj de la urbo Boras, eĉ se ili, laŭ lia diro, troviĝas en la antaŭĉambro de l' infero.

La famo de tiu nova "Mesio" atingis la orelojn de ni ĉi-lokaj SAT-anoj, k hieraŭ vespere ni du direktis niajn paŝojn al lia tendo por ke ni ricevu "refreŝigon" en nia sklaveco. Kvankam ni alvenis duonan horon antaŭ la komenco de l' spektaklo, ni tamen devis aŭskulti la elverŝadon de l' "saĝo" de sur la ekstero de la tendo, ĉar ĝi jam estis plenplena je ĉielsoifantoj.

Fininte sian babilaĉon la pastro admonis ĉiun veran parencon al dio veni al posta kunveno en urban religiuldomon, ĉar tie la jamaj piuloj helpos al novevekiĝintaj rapide k senpene fortiri sian nigran animon for el la ungegoj de la diablo k enskribiĝi en la libro de l' ĉieluloj. Post ricevo de promeso pri tia avantaĝo, vi certe komprenas, ke la du mizeraj esp-istoj ne longe hezitis, sed tuj rapidis al la domo de la piuloj. Post kelkaj minutoj tiu salonego estis okupita k komenciĝis la plej granda frenezado ĝis nun de ni vidita. La publiko konsistanta el viroj k virinoj el ĉiuj klasoj k aĝoj momente ne sentis ian interklasan diferencon k laŭŝajne ankaŭ ne interseksan, ĉiuj estis egale frenezaj. Je ekkrio de la pastro ĉiuj sin jetis sur la plankon; komenciĝis plej terurajn preĝokrioj. Ni du estis la solaj sidantoj, k la pastro iradis tien k reen inter siaj ŝafoj elbuŝigante terurajn vortojn, el kiuj ni perceptis kelkajn, ekz. "sankta spirito, per viaj flugilbatoj fortimigu la diablon de la infero" ktp.

Subite la pastro alvenis nin k demandis: "Ĉu vi estas savitaj k ne plu loĝontoj de l' infero?" Ni respondis, ke ni ne rekonas alian animon ol nian racion, ni ne sentas inklinon freneziĝi k per tio esti duo pli inter via anaro. Poste ni proponis al li diskuti pri lia religio, sed imagu — la pastro saltkuris al la predikant-seĝo k ekkriegante, ke la diablo ĉeestas inter la ŝafidoj de dio, li forte instigis la piulojn preĝi por du fulmenigraj animoj reprezentantaj la varmegan fajron.

Nun estis por ni preskaŭ neeble nin deteni de kompato por la difavoratoj, ĉar ni klare vidis, ke ni troviĝas inter frenezuloj k kompatinduloj, kiuj, dank' al trompado k babiladaĉo de tiu pastro, tute perdis sian mensan ekvilibron. La komuna preĝado fariĝis pli k pli laŭta, ĉar krude la pastro pelis la homojn pli k pli proksimen al la rando de la frenez-abismo. Per siaj strangaj sonoj la preĝantoj memorigis nin pri brutarejo kun ĝia malhoma blekado. Al ni venis piuloj volantaj savi niajn animojn. Dum interparolo kun tiuj evidentiĝis, ke ne granda k valora estas ilia klero. Dogmoj, stultoj k fabeloj el biblio estis ilia sola argumentado. Laste alvenis nin konstrulaboristo, kiu opiniis sia devo savi la du samklasanojn. Tuj ĉe la komenco de nia interparolo ni atentigis lin pri lia devo: anstataŭ esti inter tiuj ĉi mensomalsanuloj labori por plibonigi la realan vivon surteran.

Li tamen ne volis konsenti kun ni, k li klarigis pri ĉio en la ĉielo k postmorta vivo. Li ankaŭ certigis, ke ni iam staros antaŭ dio, k en tiu kunveno partoprenos ĉiu mortinto. Nun ni ne povis deteni nin de mokrido k petis, ke li sciigu nin pri la lingvo uzota en la ĉielo, ĉar kompreneble oni tie inter tiom da diverslingvanoj parolos ian universalan interĉielulan lingvon. Je tiu nia demando li senresponde malaperis inter la preĝantaron.

Sur la predikanta seĝo la pastro plendis pro ĉeesto de nesaveblaj pekuloj k ricevinte jam sufiĉan bildon pri la stato de religiuloj ni stariĝis por foriri. Interŝanĝinte kelkajn vortojn en esperanto, ni hazarde ekrigardis la vizaĝon de sidantino sur sama benko kun ni k vidis, ke ĝi heliĝas, sed denove akceptas poste malesperan